# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Marto : 1 2022


## LA AMAS-MURDANTO DE LA INSULETO UTØYA NE ESTOS PROVIZORE LIBERIGITA

Antaŭ kelkaj semajnoj, la norvega tribunalo de la distrikto Telemark rifuzis la provizoran liberigon de Anders Breivik, kiu en la jaro 2011 murdis 77 homojn en la insuleto Utøya (Norvegio).

Post dek jaroj en la malliberejo, Breivik petis obteni provizoran liberon, tamen la tribunalo decidis, ke ekzistus danĝero post tiu ebla liberigo, ĉar li ankoraŭ estas influita de ekstremismaj politikaj ideoj.



Anders Breivik en la jaro 2011 antaŭ la tribunalo kiu kondamnis lin.

En la juĝo la tribunalo asertas, ke Breivik verŝajne ne estas kapabla ankoraŭ rekoni senteme la ideojn de aliaj homoj kaj senti kompaton.

La tribunalo agnoskas, ke Breivik deklaris, ke li jam apartiĝis de tiuj ekstremaj ideoj, tamen oni ne povas aserti, ke li kredas siajn proprajn vortojn, ĉar, malgraŭ la fakto, ke li bedaŭris la doloron de siaj viktimoj, li poste defendis kaj pravigis siajn aktojn.

Ĉi-sence, Anders Breivik deklaris, ke li suferis cerbo-lavadon de ekstremisma grupo, sed li samtempe diris, ke li daŭre subtenas sian fidon sur nacisocialisman movadon.

Kiel dirite, Breivik murdis 77 homojn en la jaro 2011. Pro tio li estis kondamnita al 21 jaroj da malliberigo, kaj eĉ plu, se je la fino de tiu kondamno la tribunalo konsideras, ke li ankoraŭ estas danĝera por la socio.

La ŝtata prokuroro akceptis la juĝon pri la ne-eblo obteni provizoran liberigon. Kontraŭe, la advokato de Breivik sciigis, ke li apelacios antaŭ supera tribunalo.

## UNUAJ JURAJ KONSEKVENCOJ DE LA MILIT-AGRESO DE RUSIO KONTRAŬ UKRAINIO

La Prokuroro de la Internacia Puna Kortumo informis, ke li ĵus ekigis esploradon rilate eblajn milit-krimojn realigitajn de la rusa armeo dum la invado de Ukrainio. Alia tribunalo, la Internacia Kortumo, kiu estas la ĉefa jurisdikcia organo de Unuiĝintaj Nacioj, okazigos la venontajn 7-an kaj 8-an de marto aŭdiencojn post la denunco prezentita de Ukrainio kontraŭ Rusio, pro genocido.

Ĉi ĉio ebligas fari jenan demandon: *kiuj tribunaloj povus juĝi eblajn deliktojn plenumitajn okaze de tiu invado, aŭ eĉ la invadon mem?*

Rilate la Internacian Punan Kortumon (IPK), verdire Ukrainio ne subskribis la Statuton de Romo, traktato post kiu fondiĝis IPK. Tamen en la jaro 2014, Ukrainio agnoskis la jurisdikcion de tiu tribunalo rilate eblajn krimojn kiuj povus esti plenumitaj en ties teritorio. Kaj se paroli pri Rusio, Moskvo retiriĝis el IPK en la jaro 2016, do, ĉi tiu kortumo ne povus juĝi rusajn civitanojn kiuj troviĝas en rusa teritorio, tamen ili povus esti juĝitaj de IPK se ili estas arestitaj okaze de vojaĝo en alian landon subskribintan la Statuton de Romo, do agnoskantan la jurisdikcion de la IPK.

Kaj rilate la Internacian Kortumon? Ĉi tiu tribunalo juĝas ŝtatojn, ne homojn. Ukrainio jam prezentis plendon antaŭ ĉi tiu kortumo pro genocido plenumita de Rusio kontraŭ Ukrainio okaze de la invado. La advokatoj de Ukrainio devos defendi tiun denuncon la venontan 7an de marto, kaj tiuj de Rusio respondos la 8an de marto.

Kaj Ukrainio kaj Rusio, kiel ŝtato-membroj de Unuiĝintaj Nacioj akceptas la jurisdikcion de la Internacia Kortumo. Tamen, povos okazi, ke post la prezento de la plendo, la ŝtato akuzita, ĉi-kaze Rusio, argumentus, ke la agnosko de tiu jurisdikcio ne inkludas tian disputon. Se tio okazas, la Internacia Kortumo juĝus unualoke pri tiu proponita manko de jurisdikcio.




**EL JURA VIDPUNKTO** estas nova podkasto de Alejandro Burgos Escalante, jur-studento kaj membro de IJEA, kiu celas diskonigi en la internacia lingvo mallongajn informojn pri juraj temoj

Vi povas aŭskulti ĝin ĉe:
https://anchor.fm/el-jura-vidpunkto

# *Vorto de la Semajno*

**Alianco:** Provizora ligo inter ŝtatoj, grupoj aŭ homoj kun la celo atingi kaj ĝui komunan profiton, rezulton, sukceson aŭ rekompencon.

**Alianci:** (tr) Ligi per alianco.

**Aliancano**: Membro de alianco.

Sinonimoj: *ligo, akso, entento.*

- *Dum la milito de la triopa alianco inter la jaroj 1864 kaj 1870 Paragvajo luktis kontraŭ la triopa alianco, formita de Argentino, Brazilo kaj Urugvajo.*
- *La asocio aliancis kun aliaj similaj grupoj por peti subvencion.*
- *Tiu partio perfidis sian kutiman aliancanon en la parlamento.*
- *Dum la dua mondmilito la aliancaj ŝtatoj luktis kontraŭ la tiel nomataj aksaj ŝtatoj.*



*La geografio havigas al ni najbarojn; la historio amikojn; la ekonomio partnerojn kaj la bezonoj aliancanojn.*